

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 5

Novembro/Decembro 1977



21. Jarkunveno de GEFA en Saarbrücken

Vojaĝo al Saarbrücken

21a Jarkunveno de GEFA

Oni legas ilin kiel vinliston de abunde ekipita kelo, la staciajn nomojn rejn-mozelajn: Sinzig, Cochem, Bernkastel ĝis Trarbach, Ürig; tio gustas laŭ Müller-Thurgau, Sylvaner, Portugieser, Riesling. La gajaj homoj el la najbaraj kupeoj kaj vagonoj en ĉiu haltstacio malpliĝas. Vinrikolta sezono allogas multajn bongustemulojn semajnfine en Oktobro. Post Trier la preskaŭ malplena trajno rapidas en krepuske ŝanĝiganta pejzaĝo. Rulsone ĝi fine tondras kvazaŭ meze tra infere iluminaciitaj ŝtaluzinoj de Völklingen.

En Saarbrücken elvagoniĝis nur ankoraŭ malgranda grupeto, kiu serĉas vojindikilojn kun verda stelo. En la akceptejo ricevinte siajn foliojn oni legas, kiel trovi la akceptejon, almenaŭ. Decan komforton trovis gastoj kaj funkciuloj en „Kolpinghaus“, la domo de la kunvenoj, kaj la oportune proksimaj hoteloj. Internacieco ne estas fremda en la domoj de la mond vasta Kolpingfamilio. Patro Adolf Kolping, kiel amete nomas lin la adeptaj metiistoj, mem ŝuisto el malriĉula medio, kiel pastro fariĝis reprezentanto de katolika socialismo kontraŭmarksista. Li ne restis simbolfiguro el la pasinta jarcento, sed hodiaŭ estas konsiderenda politika faktoro.

109 aliĝintoj el 5 landoj partoprenis la GEFA-jarkunvenon inter la 7a kaj la 9a de Oktobro 1977. Samtempe kun la sabatmatena promenado tra la historio de Saarbrücken okazis ankaŭ la kunsido de komisiitoj kaj estraro. Ĉeestis kiel konsilanto la afergvidanto de BSW-ĉefestraro sinjoro Bayerath. Komence la raportoj senemocie fluis laŭ kutima maniero: jarraporto, organizaj aferoj, planitaj aranĝoj. Nur la punkto informo/varbado – ĉu pro la demisio de la ĝisnuna respondeculo, ĉu pro la trommatereco de tiu longe prokrastita temo – instigis al vigla pli vasta diskuto.

Necesis iam malkaŝe paroli pri tio, kie ni staras kaj kiel ni statas. Estus dezirinde, ke tiaj diskutoj havas pli grandan partoprenanataron kaj ne restas fermitaj en nepublika kunsido, tio estis la opinio de la plejmulto. Ne helpas optimismaj kamufladoj, ne helpas lamentaj konstatoj pri la malpliĝo de la membronombro. La granda varbkampanjo de la

lasta jaro ja alkondukis novajn membrojn kaj kursanojn, vekis interesulan eŝon, kiun kompare spertojn de komerca varbado oni povas nomi bonega. Tamen tro multaj semoj, eĉ ĝermoj perdiĝis sur nefekunda grundo, nome tie, kie ni ne sukcesis aktivigi kapablajn kulturistojn.

Ĉu la lokaj societoj vere estas ankoraŭ la spino de la movado aŭ ĉu tro multaj vertebroj jam tuberkuloze malfortas? Jaluze ni rigardas al asocioj, kelkaj grupoj aŭ certaj branĉoj de la Esperanto-movado, kiuj nekredeble kreskas kaj prosperas. Tiajn fenomenojn rezultigas ne mirakloj, sed sole persisto, diligento kaj senfine sindona laborado.

H. D. Hartig, kiu jam de pli ol du jaroj kun bonega rezulto revigligis la terminaran laboron de IFEF, ankaŭ esploris malfortojn aŭ mankojn de nia asocio kaj prezentis realigeblajn proponojn por la plibonigo de nia situacio. Li informfakte studis la misteron de sukceso, kion respegulas ankaŭ lia verko „aktivu – progresu“ eldonita de GEFA. Ĉiuj formoj kaj metodoj de organizo kaj informado povas esti je dispono al funda diskuto. GEFA ja povas ekzisti sen IFEF, sed daŭri ne sen fortaj, aktivaj grupoj. Sed la demando de prioritato inter faka laboro en IFEF kaj prospero de niaj grupoj devas ne esti alternativo por la ekzistado de GEFA.

Posttagmeza aŭtobusekskurso kun sperta gvidado vidigis historian devenon kaj postmilitan evoluon de Saarbrücken. Sur bazo de industria progreso ankaŭ arto, kulturo kaj scienco trovis sian sidejon. La nova universitato, konata muzikallernejo, menciinda teatro kaj muzeo kun fama galerio atestas tion. La ruĝa monto de Spichern, ekskurscelo, permesis nur nebule vualitan rondrigardon al certe vidinda panoramo. Soleca kruco kun la nuda dato 6.8.1870 sur tiu ĉi franca tereno memorigas pri tiu arde varmega sunotago, kiam multaj centoj da bravaj soldatoj francaj kaj germanaj sin reciproke buĉis por la intereso de siaj nacioj, pli vere ties reprezentantoj kaj profituloj, kaj ruĝigis la batalmonton per torento da senkulpula sango. Antaŭ la vespera programo, pri kies kultura nivelo nin GEFA-anoj eble estis

iom tro dorlotitaj el antaŭaj jarkunveno, prezidanto Gießner bonvenigis la gastojn kaj niajn geamikojn el najbaraj asocioj. La bondezirojn de la direkcia prezidanto kaj de BSW-distriktestaro transdiris d-ro Reißner, afablagestas levante sian glason je tosto al sukcesaj tagoj. Kiel reprezentanto de la BSW-ĉefestraro parolis sinjoro Bayerath kuraĝigajn vortojn pri nia rolo en la nuna tempo. Kolego Linnemann-Emden kunportis la salutojn kiel distrikta personar-representanto. De la sindikato GdED bondeziris s-ro Bauer. Por GDBA-estraro salutis s-ro Hebler. Sinjoro Decker estis komisiita transdoni la dezirojn de la sindikato CGDE, unuan fojon reprezentita en niaj jarkunvenoj. Sinjorino Irmtraud Hauptenthal, diris bonvenigajn vortojn nome de Sarlanda Esperanto-Ligo sur kies tereno ni jarkunvenis. Ŝi ankaŭ zorgis pri la libroservo dum la kunvenotagoj. La landaj asocioj de IFEF estis reprezentitaj de kolego Scharf por Aŭstrio, ĉefkomitatano De Sutter por Belgio, FFEA-prezidanto Robiollé por Francio kaj honora IFEF-membro de Jong por Nederlando. La vicprezidanto de nia internacia federacio Wim van Leeuwen uzis la okazon por inviti al la venontjara IFEF-kongreso en Romo. El Britio kaj Italio sinjorino Kruse citis la leterajn salutojn de niaj gekolegoj. Pli ol 150 personoj ĉeestis la vesperon, kiu tradicie finiĝis kun danco ĝis la nokto. La dimanĉa matineo estus meritinta plinombran partoprenantaron. Karajn memorojn pri Swanwick kaj Anglio revokis

la kongresfilmo de W. Barnickel. En fervojfaka programo ni filme akompanis erc-transporton de Kirun en Svedio tra Narvik, Emden ĝis ŝtalproduktejo apud Saarbrücken. La koncizan jarraporton de la prezidanto sekvis invita diapozitivprezento de la Bremena grupo, invitanto al la venonta jarkunveno, 6. – 8. de Oktobro 1978.

Aparte menciinda kaj tute ne fervojfaka prezentiĝis la lasta programero de tiu ĉi jarkunveno. Por la prospero de BONA ESPERO amika rondo, seninstitucia kun multaj fervojistaj gekolegoj, promesis al la foraj pioniroj de la brazila infanliĝo esperantista subtenon plejeban, ke tiu ĉi nobla entreprenado sukcese evoluu. Sinjorino Elfriede Kruse raportis pri historio kaj celo de la lerneja farmo Bona Espero kaj povis montri diapozitivajn fotitajn pasintjare en la farmereno. La restintaj ĉeestantoj malavare kontribuis al la kolekto por Bona Espero.

Post la adiaŭo el la 21 Jarkunveno, survoje al la 22a en Bremen altrudiĝas la demando: ĉu valoris vojaĝi al Saarbrücken? Ja, se ni sukcesas daŭrigi la diskutojn pri la kielo de nia estonto, se ni lernas el spertoj kaj eraroj, se ni kuraĝas pripensi novajn paŝojn, meti respondecon kaj laboron sur la pli vastan bazon de la lokaj societoj kaj kapablas plivigligi la grupan aktivecon.

„En Bremen ĉiam io okazas“ estas la tiea slogano kaj ni rajtas esperi, ke en Bremen jam efikas novaj impulsoj.

wbr.

Jarraporto pri la periodo de la 20a ĝis la 21a jarkunveno (1976–77)

Ni komencu per honorigo de niaj mortintoj. Estis

Franz Müller	6. 11. 1976
Anna Gisshübl,	30. 11. 1976
edzino de Alfred Gisshübl	
Günter Pawlik	Aprilo 1977
Willi Röder	Aprilo 1977
Josef Friedrich	Aprilo 1977

Organizaj aferoj

Por 1977 GEFA kotizis al IFEF por 812 membroj (individuaĵoj kaj korporaciaj). La nombro de kotizpagantaj membroj estas 526. La jarkotizo restis 9 gm. En la kongreso de Swanwick (Britio) la IFEF-estraro aludis, ke la IFEF-kotizo ek de 1979 antaŭvideble devos esti plialtigata

je 3 ĝis 4 dkr minimume. Sekve ankaŭ GEFA povos almenaŭ ĝis 1979 eviti plialtigon. Tio krome dependas de la fakto, ĉu la membronombro pozitive evoluigos aŭ ne. Tamen ni ripetu la konstaton de la lastjara raporto: Tiu kotizo restas **konsiderinde sub** la kutima nivelo de klubkotizoj.

La **laborkonsilantaro** kunvenis dufoje kun la distriktkomisiitoj (Paderborn kaj Frankfurt [M]).

Personaraj ŝanĝoj ne okazis. Sed nepre menciindas, ke la longjara sekretariino de GEFA, Elfriede Kruse, emeritiĝis la 31an de Julio 1977. Por GEFA ŝi prizorgas ankoraŭ la administradon de la financ-

rimedoj donitaj de la BSW-ĉefestraro. Si oficiale adiaŭis el la estrara rondo dum la marta kunveno en Frankfurt/M (komp. raporton en Bulteno 2/77).

Kursoj: En 1976 komenciĝis 7 kursoj kun proksimume 30 partoprenantoj. Tio estas iom malpli ol en 1975. Kvankam ne nur valoras la nombro de la kursantoj, sed eĉ pli la nombro de la postrestantaj esperantistoj kaj novaj membroj, ni tamen ĉiam denove ripetas: Okazigu multajn kursojn, bone gvidu ilin ĝis la fino kaj poste **nepre, jes nepre** zorgu, ke la kursanoj ne perdiĝos.

Kunlaboro en IFEF

Partoprenis 74 germanaj membroj en la 29a IFEF-kongreso en Swanwick. Reelektitaj estas Brandenburg/Rösemann kiel gvidanto/sekretario de la Fakprelega Komisiono.

Krome funkcias Ritterspach kiel sekretario en la Terminara Komisiono.

Hartig fondis internacian komunikilon por la Terminara Komisiono, la „Terminara Kuriero“, kiu laŭbezone kaj efike akcelas la laborojn en TK.

Kontaktoj, aranĝoj

La 20a jarkunveno okazis de la 15a ĝis la 17a de Oktobro 1976 en Paderborn. Partoprenis 134 membroj kaj preskaŭ 20 eksterlandaj gastoj. La ĉefa aranĝaĵo, nome la sabatan koncertvespero, vidis pli ol 300 ĉeestantojn. La intereso de la gazetaro en la antaŭa konferenceto kaj dum la jarkunveno estis ĝojiga. La programo estis alloga, precipe elstaris la koncertvespero, kiu publike estis anoncita kaj prezentis nur klasikaĵojn. La forumo por la publiko bedaŭrinde ne montris sukceson, ĉar ne sufiĉe bone preparita.

GEFA-membroj vizitis plurajn jarkunvenojn de aliaj landaj asocioj, la UK en Rejkjaviko, la Internacian Skisemajnon en Les Gets (Francio), la Feriosemajnon en Svisio.

La kontaktoj kun BSW kiel kutime funkciis. S-ro Bayerath, oficisto por la kultura laboro ĉe la BSW-ĉefestraro, ĉeestis en la laborkunsido en Paderborn. La malfacila situacio de DB kaj BSW speguliĝis en diversaj komplikaĵoj, kiuj ĝenerale bremsas la agadon en kulturaj grupoj.

Ankaŭ daŭris okaza kunlaboro kun Germana Esperanto-Asocio, Germana Esperanto-Instituto kaj kun la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Same daŭris la bonaj kontaktoj al la 3 sindikatoj.

Informado

Bulteno aperis kvinfoje kun 40 paĝoj kaj 11 bildoj. Ni transiris ek de n-ro 1/77 al iom pli bonkvalita papero, kiu nur malmulte plialtigas la kostojn, sed grave plibonigas la eksteran aspekton kaj la efikon de bildoj. La eblecoj, informi la fervojistaron pri nia laboro, estas limigita je la entreprena revuo „Wir“, tio signifas preskaŭ nenion. En sia decembra numero „Wir“ malagrabla kaj malafable polemikis kontraŭ ni kaj nia lingvo. La eĥo pere de „leteroj de legantoj“ estis tiel surpriza por la redakcio de „Wir“, ke ĝi publikigis en la februara numero 1977 plurajn ekstraktojn. Entute bona propagando por nia afero.

La oficialaj komunikiloj (Amtsblätter) daŭre estas je dispono de la distrikt-komisiitoj, por anonci kursojn aŭ aranĝaĵojn. En ili ni konstatis 14 publikiĝaĵojn. En tagaj gazetoj estas nombritaj 108 artikoloj pri nia laboro. La rezolucio de Swanwick aperis en „Bulteno“ kaj estas sendita al la sindikatoj. Pozitive reagis GdED en sia revuo „Der Deutsche Eisenbahner“. Ĝi ankaŭ estas sendita al BSW, al la prezidanto de FISAIC kaj flanke de IFEF al la ĉefadministracio de DB.

La migra ekspozicio kelkfoje estas prezentita. Kiu ĝin deziras, povas postuli ĝin pere de kolego Brandenburg, Hochbaubahnmeisterei 4400 Münster (Westf). En aŭtuno ni forsendis 60 000 informkartojn al ĉiuj „ĉefdeĵorejoj“. Aldoniĝis 10 000 informiloj. GEFA eldonis enkondukan kurson „Esperanto, eine lebendige Sprache“, tradukitan kaj aranĝitan de kolego Hartig el la angla lingvo.

Junularo

Bedaŭrinde nenio raportinda.

Emerituloj

Okazis unu speciala kunveno en Ulm (2.7.). La dua, antaŭvidita en Kassel, devis forfali, ĉar ne sufiĉe da partoprenantoj anoncis sin.

Gießner

Turismo

Por la 21a fojo disvolviĝos de la 26a de Decembro 1977 ĝis la 5a de Januaro 1978 la Esperantista Skiferio en Adelboden/

Svislando. Partopren-kotizoj: Gelernantoj, studentoj: 260 sfr. Aliaj partoprenantoj: 310 sfr. La detalan informilon vi povas peti al: Kultura centro Esperantista, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.

Jahresbericht über den Zeitraum von der 20. bis zur 21. Jahresversammlung

(Auszug aus dem Esperanto-Original)

Organisatorisches

Der Arbeitsausschuß tagte zweimal mit den Bezirksbeauftragten (Paderborn und Frankfurt/M).

Die langjährige Sekretärin von GEFA ist am 31. 7. 1977 in den Ruhestand getreten, besorgt jedoch weiterhin die Verwaltung der BSW-Mittel des Hauptvorstandes. Im März hat sie sich offiziell aus der GEFA-Vorstandsrunde verabschiedet (s. Bericht im Bulteno 2/77).

1976 begannen 7 Kurse mit etwa 30 Teilnehmern.

Zusammenarbeit mit IFEF

Am 20. IFEF-Kongreß in Swanwick (England) nahmen 74 deutsche Mitglieder teil. Dort wurden wiedergewählt die Kollegen Brandenburg als Leiter und Rösemann als Sekretär des Ausschusses für Fachvorträge. Kollege Hartig gründete im Ausschuß für Fachwörterangelegenheiten ein internationales Mitteilungsblatt (Terminara Kuriero), das sehr zur Belebung der Ausschußtätigkeit beiträgt. Kollege Ritterspach ist als Sekretär im Ausschuß tätig.

Das Berichtsjahr begann mit der 20. Jahresversammlung in Paderborn (134 Mitglieder, 20 ausländische Gäste, bei der Hauptveranstaltung über 300 Teilnehmer). Das Presseecho war gut. Der Tatsache der 20. Jahresversammlung wurde durch einen Konzertabend besonders Rechnung getragen. Der Sachbearbeiter des BSW-Hauptvorstandes, Herr Bayerath, nahm an der Arbeitssitzung teil.

GEFA-Mitglieder nahmen an mehreren Jahresversammlungen anderer Landesverbände teil, desgleichen am Allgemeinen Weltkongreß in Rejkjavik (Island), an der Internationalen Skiwoche in Les Gets (Frankreich), Ferienwoche in der Schweiz u. a.

Die schwierige finanzielle Lage der DB und des BSW spiegelt sich in verschiedenen Beschränkungen wieder, die allgemein die Tätigkeit der kulturellen Gruppen bremsen.

Information

„Bulteno“ erschien mit 40 Seiten und 11 Bildern. Die Möglichkeit, die Eisenbahner über unsere Tätigkeit zu unterrichten, bleibt nach wie vor auf die Unternehmenszeitschrift „Wir“ beschränkt. Eine Polemik gegen Esperanto in der

Dezember-Nummer der „Wir“ wurde durch eine Anzahl in der Februar-Nummer veröffentlichter Leserbriefe ins Gegenteil verkehrt. In den Amtsblättern erschienen 14 Ankündigungen über Veranstaltungen. In den Tageszeitungen konnten 108 Veröffentlichungen festgestellt werden. Die in Swanwick verabschiedete Resolution wurde den Gewerkschaften zugesandt. Besonders die GdED reagierte positiv in ihrer Zeitung „Der deutsche Eisenbahner“. Die Resolution wurde auch dem BSW und der FISAIC übermittelt.

Die Wanderausstellung wurde an mehreren Orten mit gutem Erfolg gezeigt. Im Herbst haben wir 60 000 Informationskarten und 10 000 Werbeblätter versandt. Im Auftrag von GEFA erschien der Einführungskurs „Esperanto — eine lebendige Sprache“, den Kollege Hartig aus dem Englischen arangiert hat.

Senioren

Mit den Senioren wurde im Berichtszeitraum am 2. 7. ein Treffen in Ulm abgehalten.

Gießner

Invito al Grainau

De la 11a ĝis la 18a de Februaro 1978 okazos en Grainau, „Haus Hammersbach“ la 19a Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno (IFES). En la nomo de GEFA la distriktkomisito por Munkeno, Josef Weidacher (kun kelkaj helpantoj) organizas la preparlaborojn. Ni jen informas vin pri Grainau kaj „nia“ skisemajno.

Proksime de la mondfama olimpika urbo Garmisch-Partenkirchen situas Grainau, la „Zugspitz-vilaĝo“. Sed ne nur la plej alta monto de Germanio kun sia preskaŭ 3000 m alta pinto estas „vilaĝpropra“, sed ankaŭ la montdusto granda kaj malgranda „Waxenstein“ (vidu foton) kaj la majesta „Alpspitze“, kiuj impone reliefigas la mirindan panoramon. La domoj tie estas pitoreskaj, tipe bavariaj, kaj la aŭtoktona enloĝantaro gastame klopodas plenumi la ĉiuspecajn dezirojn de siaj gastoj. Por skiantoj — de komencaj ĝis perfektuloj — ekzistas multaj skivojoj, al kiuj kondukas vasta reto da montarfervojoj, telferoj, skiliftoj kpt. Aŭ ĉu vi preferas la longdistancajn skiadon? Jen vojoj tra neĝkovritaj herbejoj kaj arbaroj ĉirkaŭ Grainau invitas vin.

Kiam vi lastfoje sledis? Venu kaj realigu tiun revon el viaj infanaj tagoj aŭ amuziĝu sur natura glaciejo per viaj glitŝuoj. Multaj bone flegitaj kaj regule neĝplugitaj vojoj allogas por agrable promeni aŭ — se vi emas — neĝmigradi. Se ne sufiĉas al vi la duŝo aŭ la bankuvo en via ĉambro, saltu en la ozonhavan akvon de la naĝhalo, el kiu oni havas liberan rigardon al la ĉarma Grainau kaj ĝia vintra montarpanoramo. Eble foje la suno ekstere ne brilas, tiam la endoma lumobana instalaĵo (Solarium) invitas al anstataŭa brunigado. Ĉu vi soifas post tiu proceduro? Vi nur elektu inter multaj hejmejacaj lokaloj, ili atendas vin!



Foto: Haus Hammersbach kun montoj Waxensteine

fotis: Gernot Ritterspach

Nia restadejo nomiĝas „Haus Hammersbach“. Tiu instruat- kaj refreŝighejmo de la Fervojistaj Sindikato en Germanio (GdED) havas modernajn bone ekipitajn du- kaj trilitajn ĉambrojn, en la plej alta kategorio ĉiu eĉ havas balkonon, duŝon aŭ banejon kaj necesejon. La granda manĝosalono kaj diversaj aliaj ejoj bone taŭgas por niaj celoj kaj la dompropra kegloludejo certe ofte estos okupita de esperantistoj. Por la vesperoj varia

programo estas antaŭvidita (ludoj, kantoj, filmoj, surprizoj, karnavala vespero) kaj speciale la komencantojn inter ni atendas Esperanto-intensivkurso.

Tiu kombinita aranĝo — dumtage en internacia amika rondo ĝui vintran plezuron kaj vespere kvazaŭ lude perfektigi en la Internacia Lingvo — estas certe por multaj GEFA-anoj tre alloga. Interesulojn sin turnu al Josef Weidacher, Bw München Ost. Anoncu vin, ankoraŭ estas liberaj lokoj, sed la tempo rapide pasas kaj la aliĝlimdato estas la jarfino.

Elisabeth Ritterspach

Klasika koncerto kaj magia sorĉado

Dum la Esperanto-semajnfino en Herzberg de la 4a ĝis la 6a de Novembro elstaris tri programeroj: koncertvespero, harcmontara ekskurso kaj sorĉvespero kun Triksini. Elektante la gimnazian aŭlon por la vendredvespera koncerto „De l' opero al popolkanto“ oni tro optimisme taksis la nombron de la aŭskultantoj, ĉar nur parto el ĉ. 80 aliĝintoj jam ĉeestis. Sed tiuj, kiuj nur sabaton alvenis, ja bedaŭris la maltrafon de tia muzikarta frandaĵo. Blovorkestro el „kormontaj“ gejunuloj enkondukis per uverturo. Sekvis ses konataj operkantoj nome la dueto „Aŭdu kara“ el La vendita fianĉino (Smetana), el Don Pasquale (Donizetti) la sopran-ario „Komprenas mi la arton ja“, el la Ŝtelĉasisto (Lortzing) la bas-revo pri „Kvinmil taleroj“, el la Sorĉfluto (Mozart) la dueto „Ĉe viroj kiuj sentas amon“, el La gaja virinoj (Nicolai) la tenor-ario „Kantas en la bosk' alaŭdo“ kaj kulmine la dueto „Min feliĉigas la vorto“ el Don Pasquale (Donizetti). La infanĥoro — ruĝeblanke kostumitaj knabinoj — finis la klasikan parton per „Ĝojo, vi fajrero dia“ (Beethoven/Schiller). La bonegaj, multaplaŭditaj solistoj de tiu parto: Anni Wiesmann (soprano), Alfons Hoffmann (tenoro), Walter Lange (baso), akompanitaj jen de Ulrich Mattke, jen de Beate Lange, reaŭdiĝis ankaŭ dum la dua parto, subtenantaj ĥoron kaj blovorkestron aŭ sole kantantaj, dufoje eĉ kune kun la tuta spektantaro. Jen kelkaj titoloj: Anjo de Tharaŭ, ĉe l' put' antaŭ pordego; nek fajro, nek karbo; la etaj floroj dormas; la luno jam leviĝis; sidas sur l' flava ĉara . . . Jen vesperprogramo

plenplena je perloj muzikaj, ĉu klasikaj ĉu popularaj, ĉio en bonege adaptitaj Esperanto-tradukoj de Joachim Gießner.

La sabata ekskurso tra la Harcmontaro per malgranda aŭtobuso ĉe favorega vetero kondukis dufoje tra la aŭtene ornamita altaĵo: unue laŭlonge de la DDR-linio ĝis Bad Harzburg kaj de tie al Goslar kaj reen tra Clausthal-Zellerfeld kaj Osterode. Por ĉiuspecaj klarigoj kaj informoj, ankaŭ fervojfakaj, zorgis denove sinjoro Gießner, kaj la fotemuloj trovis riĉan rikolton, ĉu pri landlimaj gvatturoj kaj diversaj barieroj, eĉ pri vaporlokomotivo antaŭ vartraĵo el oriento, ĉu pri ardezo-tegitaj muroj aŭ faktrabaj domoj.

Reveninte plenplenaj je impresoj, jen atendis tute alispeca travivaĵo. Triksini, la magiisto kun la Blua Ŝtono, prisorĉis per „magia salo“ kaj „simsalabimo“ gazetojn, ĉapelojn, kruĉojn, kravatojn, ludkartojn kaj ŝnurojn. La publiko miregis, ridis, aplaudis kaj — tutapude — la gastoj multon eksciis pri la Internacia Lingvo. Enkonduke kaj postfine de la magia programo ludis la sespersona akordeona ensemblo Bartels el Herzberg kun altranda lerteco kaj sindono. Sed laŭ mi estis iom tro da programo, je la fino mankis la atentemo, kiun ili meritis. — Kaj kiel jam la tagon antaŭe oni post ĉio ankoraŭ agrable kunsidis en familiara rondo ĝis malfrua nokto.

Dimanĉo estas la Tago de la Sinjoro. La magiisto Triksini retransformiĝis en pastron Kindler el Luksemburgo kaj frumatene jam celebris Sanktan Meson. Tagmeze li akceptis la lacajn migrantojn, kiuj revenis de traŭba promenado, en la preĝejo por ekumena diservo en Esperanto, aranĝita kune kun pastoro Brinkmann el Westerland.

Kun la komuna tagmanĝo finiĝis tiu travivoriĉa semajnfino, dum kiu ankaŭ okazis provinstruado, daŭre funkciis la GEFA-ekspozicio, pliriĉigite per Esperanto-poŝtmarkoj, multegaj libroj kaj varbiloj kunpreneblaj; funkciis krome librostando el Danlando kaj aparta de Triksini, disvendiĝis trinkaĵoj — precipe Esperantovino — ĉio en la sama domo. Multajn spertojn kolektis certe la junaj organizantoj, sub verva gvido de Peter Zilvar, sindone subtenitaj inter alie de Werner Heimlich kaj la presisto de nia Bulteno, Wolfgang Zietz kaj edzino. Sinceran dankon al ĉiuj kunagintoj.

Ritt

Por la prospero de Bona Espero!

Dum la ĉijara GEFA-jarkunveno en Saarbrücken okazis lumbildprelego pri Bona Espero. Kvankam la plejmulto de la ĉeestantoj pri la vivo en Bona Espero jam estis informita, la diapozitivaj kaj la aktuala raporto de sinjorino Kruse impresis nin. Ŝi menciis, kia necesa estas la helpo nun, ĉar post pluvego la akvo detruis la pontojn al la infanvilaĝo. La aŭskultantoj grandanime kontribuis al monokolekto. La rezulto estis 340,— gm. Fervojistaj Esperanto-Rondo Münster (Westf.)

US

La 16an de Aŭgusto 1977 gesinjoroj Grattapaglia, la gvidantoj de la Esperanto- infanvilaĝo Bona Espero ĉe la brazilia ĉefurbo Brasilia, vizitis Schwelm. GEFA-membroj invitis ilin veni al Schwelm dum renkontiĝo ĉe la Universala Kongreso de Esperanto en Reykjavik.

Post lumbildprelego en gasteja salono sinjorino Grattapaglia respondis multajn demandojn. Inter la 45 vizitantoj estis pli ol 10 junuloj. La urbestro de Schwelm, kiu ankaŭ ĉeestis kun edzino kaj unu filino, transdonis flagon de la urbo, kiu intertempe pendas en la manĝosalono de Bona Espero. Dum la kunveno la amikoj el Schwelm kaj ĉirkaŭaĵo donacis 301 markojn, kiujn ni transdonis al gesinjoroj Grattapaglia, por ke ili povus aĉeti cementon por la riparado de domoj kaj pontoj en Bona Espero. Schindler

Termina Angulo

Jen la ekstrakto el la diskuto pri la Termina Angulo 2: (Bulteno 4/77)

1. Grundriß = horizontala projekciaĵo;
2. Reißverschluss = zipo; 3. Gefrierpunkt = glaciĝ-punkto; 4. Schiebetür = ŝov-pordo; 5. Flügeltür = svinga pordo;
6. Steckdose = ŝtopilingo; 7. Verlängerungsschnur = plilongiga ŝnur-konduktilo;
8. Zerstäuber = sprajilo (tiu neologismo el la „Technisches Wörterbuch“ de Haferkorn ne estis ŝatata pro la malfacila prononcado); 9. Parkplatz = parkejo;
10. Kupplung (Auto) = kluĉilo.

Jen dek novaj terminoj:

1. Autobahn
2. Landstraße
3. Dieselkraftstoff
4. Aufenthaltsbahnhof
5. verbogen
6. Seitenschlag eines Rades (eiern)
7. Sichtbehinderung
8. Klarsichtscheibe
9. Knotenblech
10. Kreischende Bremsen

El la grupoj / Aus den Gruppen

Essen/Dortmund

Nach dem Veranstaltungsplan des Rheinisch-Westfälischen Auslandsinstituts ist der Esperanto-Kreis Dortmund, dem auch die Eisenbahner-Esperantisten des Bezirks angehören, mit jeweils 2 Veranstaltungen im Monat vertreten. Das Programm wird z. T. von unseren Mitgliedern mitgestaltet. Anneliese Köhler, Schwelm, zeigte in einem Dia-Vortrag „Natur um uns“ die Beobachtungen bei Sparziergängen durch die Jahreszeiten. „Esperanto in der Fachsprache“ und „Internationale Kongresse und Begegnungen ohne Sprachschwierigkeiten“ bietet das Programm für die beiden letzten Veranstaltungen des Jahres 1977.

Köln/Schwelm

Zamenhoffesto por la regiono Rhein-Ruhr-Wupper kaj GEFA-distriktjarkunveno. Sabato, 3an de Decembro 1977, je la 16a kaj 30 h, okazos en Schwelm Zamenhoffesto kaj samtempe GEFA-distriktjarkunveno por la distriktoj Köln kaj Essen. Kunvenejo estos restoracio Ellinghaus, Schwelm, Kölner Straße 29 (proksime de Christuskirche ĉe Altmarkt, ĉirkaŭ 10 minuta piedvojo de la stacidomo).

Komenco de la programo je la 17a kaj 15 kun filmprelego. Post la vespermanĝo estos amuza vespero kun divenludo kaj danco.

Vi povas anonci ĉe Heinz Schindler, Bahnhof 5830 Schwelm. (La membroj de la GEFA-distriktoj Essen kaj Köln estis informitaj per speciala cirkulero).

Nürnberg/Lichtenfels

30 esperantistoj el Bavario kunvenis en Lichtenfels komence de Oktobro. Oni ĉefe diskutis pri verbaj agadoj. Hans Müller montris lumbildojn de IFEF-kongresoj en multaj eŭropaj landoj. Aŭtobusekskurso kondukis la partoprenantojn al la interesaj vidindaĵoj de Frankonio: Schloß Banz, Staffelstein, Vierzehnheiligen. Zur Aktivierung der Gruppenarbeit wurden zum 1. 9. 1977 folgende Gruppen gebildet:

Nürnberg/Regensburg; Leiter: Röder
(Basa 812/5724)

Lichtenfels; Leiter: Müller
(Basa 842/388)

Weiden; Leiter: Dandorfer
(AW Weiden)

Letzte Nachrichten

30. IFEF-Kongreß vom 13. — 20. Mai 1978 in Rom

Anmeldevordrucke können interessierte Mitglieder bei den Bezirksbeauftragten und dem Sekretär der Vereinigung, BAmtm Schrapp, SV Nord — Gruppe BVA —, 4400 Münster i. W., Basa 945/1771, anfordern.

Die Bezahlung in \$ oder Sfr kann u. a. durch die DVKB vorgenommen werden. Auftragsvordrucke sind bei den Haupt- und Zweigstellen erhältlich.




Foto aus „DB-Pressedienst“

Al niaj membroj kaj eksterlandaj geamikoj ni deziras ĝojigan Kristfeston kaj sukcesplenan Novan Jaron.

Germana Esperanto Fervojista Asocio

Das wichtigste dieser Ausgabe in deutsch

Seite 5: GEFA-Jahresbericht

Redaktfino por n-ro 1/78 estas
la 15. 1. 1978